

Heinrich Heine,
 Pinarbo staras sola
tradukita de Friedrich Pillath

Pinarbo staras sola
 En nordo sur nuda altaĝ'.
 Ĝi dormas; el neĝ' kaj glacio
 Ĝin kovras blanka litaĝ'.

Songadas ĝi pri palmo
 Ĝemanta en orient',
 Soleca, sur arda deklivo
 En maldolĉega silent'.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Fichtenbaum steht einsam” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04-03).*

Arg-1023-2287 (2015-03-19 16:43:44)

Tiu ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/heine/pinarbo.html>.

Heinrich Heine,
 En nord' unu pino
tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

En nord' unu pino en solo
 Dormetas sur nuda altaĵo;
 Glacia kaj neĝa tavolo
 Ĝin kovras per tomba tolajo.

Ĝi songas, ke palmo gracia,
 En unu dezert' orienta,
 Eterne pri lando alia
 Malgaje sopiras silenta.

*Traduko de la Germana poemo “Ein Fichtenbaum steht einsam” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.